

n-ro 63

januaro 1999

La Merkato

ISSN 0941-9306

*Feliĉon kaj Sanon,
Prosperon kaj Sukceson
en la Nova Jaro,
plie multe da ĝojo kaj plezuro en
via agado por IKEF kaj Esperanto
deziras al ĉiuj niaj membroj
la Estraro de IKEF.*

Enhavo

Diversaj informoj: UK Berlino, nova IKEF-informilo, kunlaboro IKEF-TAKE, peranto Italio, identecŝildaro	3-4
Sciencistoj kaj teknikistoj renkontis en Prago	5
Internacia Tradukreto (ITRE)	8
Komercaj petoj kaj proponoj	11
Novaj retpaĝoj: komerco.com	12

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Seikō Yamasaki; D-ro Rainer Kurz, S-ro Wang Tianyi

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgründestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu!

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraĵoj.

IKEF-informoj en Interreto: <http://komerco.com/ikef>

La jara **membrotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoŝtanco) estas akceptataj. Kurzoj estis proksimume 1 IRK = 1 USD = 0,85 EUR. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokoto. Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

Kontoj: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c

- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Perantoj

Belgio kaj internacie: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto [financoj\(a\)fel.agoranet.be](mailto:financoj(a)fel.agoranet.be), belga pŝk. 000-0265338-43)

Ĉeĥio: S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/reg.420-631-332507, retpoŝto [vlada_hasala\(a\)iol.cz](mailto:vlada_hasala(a)iol.cz)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto [efikso\(a\)aol.com](mailto:efikso(a)aol.com)

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

Hungario: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pŝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

Vendejo/ekspozicio de Esperantistaj komercistoj

dum la 84-a UK en Berlino 1999

Dum la lastjara Universala Kongreso en Montpeliero ekestis inter la ĉeestantoj de la kunsidoj de IKEF kaj de TAKE la propono, ke dum la posta UK en Berlin IKEF kaj TAKE komune aranĝu vendejon/ekspozicion/bazaron/foiron, en kiu Esperantistaj komercistoj povas oferti/vendi siajn varojn. La ejo de tiu aranĝo estu aŭ ene de la kongresejo aŭ tuj apude. En ambaŭ kazoj ni bezonus la rajton por tio de UEA.

Dum nia intertraktado de tiu temo kun UEA montriĝis, ke la kostoj por tiu aranĝo estos sufiĉe altaj. UEA ofertis al ni du giĉetojn po 2-3 m longajn, t.e. sume longo de ĉirkau 5 metroj, je prezo kiun IKEF kaj TAKE povus pagi. Povas esti, ke tiu spaco estos tro malgranda por la afero. Tial ni intencas negoci rekte kun la posedanto de la kongresejo, ICC Berlin, ĉu iu loko apude, tre proksime al la kongresejo estus luebla.

Por povi ĝuste decidi, ni nepre bezonas la indikon kaj ideojn de tiuj membroj de IKEF kaj TAKE/LA DOMO, kiuj intencus uzi parton de la disponebla loko, t.e. kiuj vendos/ekspozicios siajn varojn. Do bonvolu informi nin pri viaj planoj, t.e. aparte pri la speco de via varo ofertota kaj pri la bezonata loko en kvadrataj metroj aŭ longo de giĉeto kaj pri la tempodaŭro de via agado tie (ekzemple tuta semajno plentage, aŭ 2 tagoj plentage, aŭ tuta semajno posttagmeze).

Je la kalkulado de via bezonata spaco bonvolu agi ŝpareme, ĉar ni ne povas garantii al la interesatoj la disponon de sia nomita kvanto da loko. En kazo ke la postulata loko estus pli granda ol la disponebla, ni kompreneble devus dispartigi ĝin partatempe inter la interesatoj. Rajtigotaj por partopreno estas membroj de IKEF kaj TAKE, kaj se la spaco sufiĉas, aliaj Esperanta-parolantaj komercistoj. Pri la prezo por la spaco uzota, aktuale ni ne povas indiki precizan oferton, ĉar kalkulado ankoraŭ ne eblas, sed ni serĉos la plej favorajn kondiĉojn kaj ĝustatempe interkonsentos pri tio.

Bonvolu sendi viajn informojn ĝis 15 februaro 1999 per

ordinara letero, telefakso au retroŝto al la prezidanto de IKEF. Jen lia adreso:

Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl; telefono 07223/942064, fakso 07223/942065, reto F.J.Braun(a)t-online.de

fjb

Nova IKEF-informilo

Kun ĉi tiu numero de La Merkato vi trovos aktualigitan version de la IKEF-informilo. Haveblas pli da ekzempleroj ĉe Roland Rotsaert.

Kunlaboro IKEF/TAKE

Al la respondilo aldonita al LM62 reagis 24 IKEF-anoj. 23 aprobas la kunlaboron kun TAKE; 18 rigardas la TAKE-revuon 'La Domo' interesa por ili. 16 ne volas membriĝi en TAKE, malgraŭ rabatita tarifo, 4 jam estas membro de TAKE, 4 volas nove aliĝi.

Post diskuto en la IKEF-estraro, jen la komuna tarifo IKEF/TAKE valida ekde 1999 (en eŭroj, tio nun estas la librotena valuto de IKEF):

landoj kat. A:	27 EUR
landoj kat. B:	18 EUR

Jamaj dumvivaj membroj de IKEF pagu duonon de tiu tarifo. Pago eblas al IKEF aŭ TAKE; la asocioj inter si kompensos la ricevitajn pagojn.

fjb/rr

Peranto por Italio

Ekde 1999 d-ro G. Polerani anstataŭas d-ron M. Picasso kiel IKEF-peranto por Italio

Nova identecŝildaro planata

Pro nesufiĉa intereso ĉe la membroj IKEF ĉesis antaŭ kelkaj jaroj la eldonon de identecŝildaro (iŝ). Anstataŭe, ĉiujare memrolisto estis dissendita. Ĉar venis pluraj petoj por denove havi kompletan IKEF-adresaron kun informoj pri ofertoj kaj bezonoj de la membroj, mi planas dum 1999 denove produkti iŝ, tamen verŝajne ne plu en papera formo sed sur disketo kaj/aŭ interrete. Samtempe mi intencas restrukturigi la IKEF-adresaron, kiu estis planita en tempo kiam fakso estis malofta kaj retadreso nekonata. Por korekti kaj kompletigi la informojn, mi aldonas al ĉi tiu numero de LM slipon kun viaj nunaj registraĵoj. Bonvolu havigi al mi la necesajn adaptojn. Ekrealigo de nova adresaro kaj iŝ dependos de trovado de komputila programo ne tro kosta, taŭga por multlingva uzo kaj kiel adresaro kaj facile konvertebla al interreta formato.

rr

Sciencistoj kaj teknikistoj renkontis en Prago

La 11an ĝis la 13an de novembro 1998 okazis en Prago KAEST '98. KAEST (Kolokvo Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) estis aranĝita de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio sub la aŭspicioj de UEA kaj ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista). Ĝin ĉeestis 40 partoprenantoj el 8 landoj (AT, BG, CZ, DE, FI, HU, PL, SK). Inter ili estis pluraj IKEF-membroj.

La partoprenantoj (multaj havas doktoran aŭ profesoran gradon) prezentis plejparte prelegojn el siaj fakoj. La lingva kaj faka niveloj de preskaŭ ĉiuj prelegoj estis tre alta.

La kolokvo konsistis el kvar ĉefpartoj:

- Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko ĝenerale, prezidis Prof.Dr. Otto Haszpra (HU)
- Modernaj rimedoj de komunikado: ties avantaĝoj kaj problemoj, prezidis Prof.Dr. Reinhard Foessmaier (DE)
- Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto, prezidis Prof.Dr. Hans-Michael Maitzen (AT)
- Ronda tablo pri ĝeneralaĵoj sub gvido de Dr. Petro Chrdle (CZ)

Precipe la ĉefparto pri komunikado montris ankaŭ la aplikojn

de scienco por komercaj celoj. Tie ankaŭ la komerce interesita partoprenanto lernis multe pri la modernaj uzeblecoj de komputiloj kaj interreto.

El la multaj elstaraj kontribuoj mi volas mencii almenaŭ jenajn:

- Aŭtoraj rajtoj internacie (Chrdle)
- Komputiligo de Esperantolibroj (Malovec)
- Uzado de amaskomunikiloj por Esperanto-instruado (Quednau)
- Terminologi-sciencaj konceptoj de Eugen Wŭster (Blanke)

Ankaŭ mi prezentis prelegon, nome "Interreta telefonado, novaj eblecoj ankaŭ por esperantistoj".

La kolektaĵo pri la prelegoj aperos ĉe KAVA-PECH fine de la unua jarkvarono 1999. Ĝi enhavos krom la prezentitaj kontribuoj ankaŭ resumojn de ĉiuj prelegoj en la gepatra lingvo de la preleginto, la angla, la ĉeĥa kaj la germana lingvoj, do estos bone uzebla kiel reklamilo direkte neesperantistojn.

La partoprenantoj konstatis ke KAEST estis inda kaj sukcesa kolokvo. Tre gravis ankaŭ la multaj eblecoj renkontiĝi persone kun la partoprenantoj. Danke al gesinjoroj Chrdle de KAVA-PECH la tuta kologvoorganizado funkciis perfekte, kvankam indas plibonigi la tempokontrolon (ĉiu kontribuo daŭru nur maksimume 30 minutojn).

Fine ni, la partoprenantoj unuvoĉe decidis ke KAEST estu estonte regule aranĝata en Prago. La informoj pri venonta KAEST sekvas post ĉi tiu artikolo.

D-ro Rainer Kurz, estrarano de IKEF

2000-11-10/12, Prago: KAEST 2000

Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko

Sekcio A: Ekonomiaj problemoj sojle al la tria jarmilo

Sekcio B: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto

Nova TTT-ejo pri fiziko

S-ro Luis Guillermo RESTREPO RIVAS el Kolombio antaŭ nelonge kreis TTT-ejon kiu kolektas informojn pri fiziko (kaj najbaraj fakoj: scienco ĝenerale, astronomio, matematiko...). Jen la adreso: <http://fiziko.org>. La prizorganto estas kontaktebla je <estro(a)fiziko.org>.

Internacia Konkurso de Radio Havano

La Medicina Asocio de la Karaiboj (mallongigo AMACA (hispane) aŭ CMA (angle) - retadreso <delaos(a)ceniai.inf.cu>) kongresos je 21-24 aprilo en Havano, Kubo. Ĉefa kongrestemo estos 'la sano de la turistoj'. Je tiu okazo ĝi organizas konkurson 'Per kiuj rimedoj plibonigi la sanon de la turistoj'. Premio por la plej bona kontribuo: vojaĝo al Kubo por partopreno en la kongreso. Krome estos diplomoj por la 10 plej bonaj respondoj. Sendu vian kontribuon al: Radio Havano, pk. 6240, Havano, Cuba, fakso (537)706103 aŭ 795007, rete <radiohc(a)mail.infocom.etecsa.cu>.

Radio Havano Kubo <rhc(a)radiohc.org>

Vivanta vortaro de Esperanto

Estis lanĉita projekto por kolekti novajn esperantajn vortojn (ne neologismojn!) aperintaj en revuoj, libroj, ktp. La informo alvenis tro malfrue por aperi en ĉi tiu LM. Detaloj estos en LM64. Interesitoj povas rekte peti informojn de <kongreso(a)svn.com.br>.

rr

RET-INFO: Profitu el interreto!

Interreto kvazaŭ estas eltrovita por esperantistoj, ja ĝiaj eblecoj pri rapida kaj malmultekosta korespondado estas ege utilaj. Kreskas la retaj servoj. Unu el la plej sukcesaj estas la Esperanto-novaĵservo RET-INFO, kiu distribuas por la dezirantoj movadajn informojn, novaĵojn, interesaĵojn per retpoŝto!

Al la reto de RET-INFO apartenas jam nun plurcent aktivuloj, interesiĝantoj, redaktoroj de preskaŭ ĉiuj signifaj E-gazetoj, estraranoj de E-asocioj - do ĝi estas unu el la plej efikaj informfontoj. Aliĝantoj ricevas en ĉiu labortago averaĝe 2-5 (filtritajn) mesaĝojn, do oni ne plu devas vagadi en la reto nek devas legi eventuale neinteresajn mesaĝojn de novaĵgrupoj. La filtrado garantias, ke estu dissendataj vere nur la E-movadaj informoj, kaj oni ne plenigu vian poŝtkeston per ĉiaspecaj flankaj mesaĝoj.

La RET-INFO distribuas informojn rilatantajn pri la Esperanto-movado - sed ne okupiĝas pri lingvaj aferoj, literaturaĵoj, reform-projektoj, poeziaĵoj, diskutoj, ktp. Simile al taggazetoj ĝi raportas pri la eventoj de Esperantio (UEA, TEJO, fakaj kaj landaj asocioj, renkontiĝoj, faka aplikado, novaj E-rilataj servoj en la reto, diskoj, filmoj, kasedoj, ktp.)

Ankaŭ vi povas aliĝi. La mesaĝoj de RET-INFO estas dissendataj per simpla ret-poŝto (e-mail), do vi ne devas havi aliajn programojn, kaj ne devas vagadi en interreto. La servo tamen ne estas senpaga, la aliĝkotizo por 12-monata periodo estas 25 guldenoj por B-landanoj kaj 45 guldenoj por A-landanoj. Vi povas aliĝi iam ajn (ne nur en la komenco de la jaro!) Ni havas kotizperantojn en pli ol 30 landoj (la samaj kiuj akceptas abonojn al Eventoj). Por aliĝi simple sendu la aliĝkotizon al la UEA-konto ELLS-S aŭ al iu peranto kaj informu la administranton pri viaj retadreso kaj nomo.

Laszlo Szilvasi, administranto de ret-info

La ĉina peranto de IKEF, Ĉielismo VON (WANG Tianyi) kolektas ret-adresojn de IKEF-anoj. Nun lia kolekto jam havas la ret-adresojn pli ol 50, kiuj estas kontakteblaj per Interreto. Por plikompletigi la ret-adresaron anoncu vian al la Ĉielismo VON <komerco(a)esperanto.nu>.

Internacia Tradukreto pere de Esperanto (ITRE)

Kvankam oni ne multe povas legi pri ITRE, ĝi ekzistas kaj funkcias, sed bezonas seriozan helpon por kontentigi kaj la tradukantojn kaj la "kunordiganton".

1) naskiĝo

Multaj esperantistoj jam imagis tian servon perfekte kongruan kun la esenco de Esperanto: interpopola lingvo, sed lingvo respekta al ĉiu lingvo ; lingva ponto inter malsamaj kulturoj, inter la diversegaj kulturaj dirmanieroj; multaj esperantistoj jam pensis ke Esperanto povas helpi la laboradon de la tradukistoj, multobligante la lingvajn kapablojn de ĉiu preskaŭ sen plia peno. Inter la koncepto kaj la realigado estis granda paŝo, kiu ebligis dank'al la apero de modernaj komunikiloj: fakso, modemo, elektronika poŝto. Tial nur en 1994, dank'al la agademo de sinsekve Claude Bodson, Paul Samain kaj mi mem, estis realigita Internacia Tradukreto pere de Esperanto (ITRE), kun nun 67 tradukantoj por 27 lingvoj.

2) kiuj rajtas partopreni ?

Ne ĉiuj membroj de ITRE estas profesiaj tradukistoj; tamen ĉiu devas labori kun profesinivela kvalito: ĝisdata kaj altkvalita servo al mendintaj klientoj. Do rajtas partopreni en ITRE unue la profesiaj tradukistoj; due sufiĉe altnivelaj esperantistoj; trie fakaj tradukhelpantoj.

La baza regulo estas ke ĉiu tradukas de sia denaska lingvo al Esperanto kaj de Esperanto al sia denaska lingvo. Ekzemple: se hispana entreprenisto deziras havi tricentvortan tekston en ĉina lingvo kaj se li petas la servojn de ITRE-ano,

-
- a) la hispana ITRE-ano tradukas de la hispana lingvo al Esperanto;
 - b) li sendas per rapida komunikilo la esperantlingvan tekston al ĉina ITRE-ano;
 - c) la ĉina ITRE-ano tradukas de Esperanto al la ĉina lingvo;
 - d) kaj samrapide resendas la ĉinan tradukaĵon al la hispana ITRE-ano;
 - e) la ITRE-ano provizas la entrepreniston per la mendita ĉinlingva teksto, kaj fakturas la finitan laboron. La tuta afero daŭras malpli ol 48 horoj;
 - f) post la pago de la fakturo, la hispana ITRE-ano devas repagi al la ĉina 40 % de la fakturo.

Atentu ! tio estas nur ekzemplo, sed la konkretaj okazoj povas sin prezenti alimaniere: ili povas esti letero, kiun oni devas samtempe sendi al la adresato, aŭ teksto, kiun oni devas sendi al presisto per disketo, aŭ letero, kies tradukon mendas ne la sendinto sed la adresito, ktp...

3) el kiuj ĝi konsistas ?

Nun ITRE konsistas el 67 tradukantoj por 27 lingvoj : albana, angla, bulgara, ĉina, dana, estona, finna, franca, gaela, germana, greka, hispana, hungara, itala, japana, kataluna, litova, nederlanda, persa, pola, portugala, rumana, rusa, suahila, turka, ukraina, uzbeka. Tio ŝajnas jam sukcesa, sed tute ne sufiĉas. Kial ? Ĉu estas tiom da mendoj ?

a) mankas lingvoj: kompreneble 27 lingvoj kontraŭ laŭdire pli ol 3000 ! sed ne temas pri tio: ITRE ne enhavas la lingvojn de grandaj komunumoj, ekzemple la araba aŭ la india ; kaj ĝi ne enhavas ĉiujn oficialajn lingvojn de Eŭropo: mankas la sveda.

b) mankas fakoj. Jes ĉar neniu tradukisto povas mem traduki ĉiajn fakajn terminojn. Do ĉiu ITRE-ano anoncas sian fakon: ekonomio, scienco, juro, turismo, komerco, medicino... Mi tiel nombris 65 fakojn. Fakoj validas nur se en almenaŭ du lingvoj ĝi estas same anoncita.

c) mankas tradukistoj: laŭ mia sperto, kiam estas malpli ol 5 tradukistoj por unu lingvo, povas esti ege malfacile, trovi liberan tradukiston por plenumi urĝan tradukmendon. Do por plej bona servo por 27 lingvoj, necesas almenaŭ $27 \times 5 = 135$ tradukistoj. La problemo ekzistas por preskaŭ ĉiuj lingvoj, krom la franca, la hungara kaj la pola.

4) la esperoj de la partoprenantoj ?

Elreviĝas multaj ITRE-kandidatoj, ĉar tre ofte ili kredas, ke partoprenante en ITRE, nature kaj aŭtomate ili ricevos labormendojn : "nun mi atendas la laboron". Tute ne ! Ne nur ili devas esti bonaj lingvistoj, sed ankaŭ ili devas esti bonaj komercistoj. Li devas mem trovi sian propran klienton, kaj do por tio atenti pri la landa leĝo. Nur liaj klientoj certe mendas traduklaborojn. Tie ĉi staras unu el la plej grandaj malfacilaĵoj : oni devas esplori sian merkaton science. Tial ITRE kunlabore kun IKEF eldonis antaŭ tri jaroj 12 paĝan dokumenton "al merkatesplorado" ; ĝi daŭre estas havebla ĉe Roland Rotsaert aŭ ĉe mi.

Kelkaj estas membroj de ITRE nur por helpi al aliaj tradukistoj pri fakaj nocioj (hortikulturo, medicino, radiologio...) Ilin ne koncernas la ĵusa diraĵo.

5) Kion fari por plibonigi tiun servon ?

Oni devas konfesi, ke la laborkvanto en ITRE ne atingis sian kulminon. Inter la ITRE-anoj, 9 estas profesiuloj. Bonege ! Tio montras, ke la klopodo de ITRE interesas ankaŭ ilin. Sed tio evidentiĝas ankaŭ, ke multaj aliaj devas profesiiĝi. Ne ĉiuj esperantistoj kapablas profesie traduki, sed multaj povas fariĝi mendoprovizantoj. IKEF kaj UEA reklamas por ITRE. Bonege ! Sed ankaŭ simplaj esperantistoj povas fari ion por diskonigi nian traduk-servon. ITRE havas sian TTT-paĝojn, en kiuj oni trovas ĉiujn detalojn. Ili estas legindaĵoj kaj eble plibonigeblaj: <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/ret/itre.htm>.

La sukceso de esperantista tradukservo kiel ITRE estus grandega paŝo por la historio de Esperanto en ekonomia medio. Ĝi povas realiĝi per la kombino de tri kapabloj : la tradukistoj tradukas, la komercistoj komercas, la esperantistoj parolas.

Daniel Durand

Novaj membroj

262. S-ino WANG Yong Hong, Rue Hoyoux 159, B-4040 HERSTAL, Belgio, °1959, tel.+ 32 (0)4 240.47.09

274. S-ro ZHANG Ci, Jisuanji-Tongxin-Yanjiusuo, Shijiazhuang-Tiedaoxiueyuan, CN-050051 SHIJIAZHUAN, HEBEI-provinco, Ĉinio; retadreso <shuqinl(a)sj-user.he.cninfo.net>

275. S-ro Bernard STOLLMAN - MUZIKOM, 24a et., 515 Madison Ave., New York, NY 10022, Usono; fakso (212)7584332, retadreso <gardrajt(a)aol.com>

Nova dumviva membro

183. HUANG Zengsu

Novaj adresoj kaj kompletigoj

115. Volker HANK, Eschenweg 27, D-08393 MEERANE

256. Jorg DE MULDER, Muggenberglei 22, B-2100 DEURNE, tel. + fakso +32-3-3227201

269.S-ino Viŝnja BRANKOVIĈ, organizo de internaciaj kunvenoj, telefono+fakso +39-40-767-875, rete <orbispictus(a)iol.it>

Universitata korespondpeto

Esperanto-kursanoj de universitato de Lille (norda Francio) deziras korespondi kun E-lernantoj de aliaj universitatoj tutmonde. Kontakto <florianne.scheers(a)sni.fr>.

Komercaj petoj kaj proponoj

Internacie - Nederlando

Por eksportpromocia projekto la Ĉambro de Komerco en Arnhem serĉas kontakton kun bonkvalitaj kaj rekonitaj merkatesploraj burooj en ĉiuj landoj. Kandidatoj sin proponu kun referencoj ĉe: Kamer van Koophandel Centraal Gelderland, Kronenburgsingel 525, postbus 9292, NL-6800 KZ ARNHEM; fakso 026-3538952, rete <int.trade(a)arnhem.kvk.nl>.

Ĉinio

Ĉina Pomo

marko: Rugha Fuji, dimensio: 75-80mm, pakumo: kartono/5 - 10kg laŭ mendo; prezo: 0.36USD/kg FOB Ĉina haveno/landlimo; pago: T/T aŭ L/C

marko: Ĉina Krono; dimensio: 75-80mm; pakumo: kartono/5 - 10kg laŭ mendo; prezo: 0.25USD/kg FOB Ĉina haveno/landlimo; pago: T/T au L/C

China kapsiko sekigita - marko: Ĉina Ruĝo; longo: 100mm - 150mm; pakumo: Jutsako/50kg; Prezo: 1.0USD/KG CIF ĉefa haveno; pago: T/T au L/C

Kontaktu WANG Tianyi <komerco(a)esperanto.nu> (detaloj p. 2)

S-ro ZHANG Ci (IKEF 274), Jisuanji-Tongxin-Yanjiusuo, Shijiazhuang-Tiedaoxiueyuan, CN-050051 Shijiazhuang, Hebei-provinco, Ĉinio, <shuqinl(a)sj-user.he.cninfo.net> proponas ĉiutagajn necesaĵojn, metiartaĵojn, ludilojn, kuracilojn kaj elektraĵojn; ankaŭ liveras diversajn informojn kaj servojn pri la Ĉina komerco.

Germanio

Harald Schicke (eldonejo MZ-Verlag) daŭre serĉas desegnaĵojn kaj fotojn pri kuracherboj kaj naturkuracado. Proponu ofertojn al MZ-Verlag, Puettjerberg 17, D-27383 HETZWEGE; fakso +49-4263-94088, rete infomz-verlag.de, TTT www.mz-verlag.de.

Jaro 2000 kaj eŭro

Pri nova eŭropa valuto eŭro ekzistas retpoŝta diskutlisto Euro-L. Por aliĝi sendu retmesaĝon kun nur subscribe euro-l en la teksto al <listserv(a)bart.esiee.fr>. Atentu: venos konfirmilo kaj necesas rekonfirmi resendante la mesaĝon kun ok ene de 48 horoj.

Je www.ispo.cec.be/y2keuro estas grupigitaj interretaĵoj

rilate al eŭro kaj komputilaj problemoj pri la jaro 2000. Je www.ispo.cec.be/ecommerce/ troviĝas amaso da informoj (nur en angla lingvo) pri komerco tra interreto.

Terminologio: multlingva terminaro pri sano

IUHPE/EURO (Eŭropa sekcio de Internacia Unuiĝo por Sanedukado), kun helpo de la Eŭropa Unio, kompilis kaj eldonis '*Multilingual European thesaurus on health promotion*' en kvar lingvoj: angla, franca, germana kaj nederlanda. Sano ja ne estas IKEF-temo, sed la strukturo de la terminaro povas havigi ideojn al terminaristoj ĉe IKEF.

La terminaro (A4, 250 p.) haveblas senpage ĉe s-ro Gottfried Thesen, EC - DG V/F/3, EUFO 03/3180, L-2920 Luksemburgo, fakso +352-4301-320059. Ĝi ankaŭ estas konsultebla en la retpaĝoj de samcela nederlanda organizo NIGZ: www.nigz.nl/methp.html. Se EU daŭrigos la subvenciadon, pliaj lingvoj estos aldonataj.

Nova ejo en Interreto: komerco.com

La nova TTT-ejo <<http://komerco.com>> jam funkcias, sed mankas anoncoj. Mi petas viziti la paĝon <<http://komerco.com/anonco>> por aŭtomate sendi al la redaktanto vian anoncon. Nun la anonco estas senpaga. La nova TTT-ejo <<http://komerco.com>> povas SENPAGE akcepti kelkajn paĝojn, laŭ jenaj kondiĉoj:

- 1- La paĝaro estu ĉefe, dezirinde tute, esperantlingva.
- 2- La paĝaron oni sendu pretan (en HTML) etigita per konata sistemo, prefere .ZIP aŭ .SIT aŭ .HQX (se faritaj en Makintosh komputilo), algluita al retpoŝta mesaĝo sendita al <[tekniko\(a\)komerco.com](mailto:tekniko@komerco.com)>. Se la paĝo estas simpla, ununura dosiero, sen grafikaĵoj nek aliaj disaj eroj, ni povas akcepti ke oni sendu en formo HTML (*.htm, aŭ *.html). Ne necesas etigi ĝin.
- 3- La paĝaro, kun ĉiuj eroj (ekz: grafikaĵoj), ne estu pli granda ol 20 kilobajtoj.
- 4- La paĝaro aperos en adreso laŭ formo: <<http://komerco.com/aaaa>> kie "aaaa" estos nomo proponita de la sendinto/posedanto de la paĝaro.
- 5- Ni rezervos por ni la povon decidi kiam ni ne plu akceptos

paĝojn pro spacaj limoj en nia servilo, aŭ pro aliaj kialoj.

Ni ankaŭ proponas al la legantoj viziti la ret-paĝon <<http://komerco.com/IKEF>>.

la Ĉina peranto de IKEF, Ĉielismo VON <[komerco\(a\)esperanto.nu](mailto:komerco(a)esperanto.nu)>